Aŭtuno 2013
Kajero 1

# Oni Diras Nun!

Sendependa Gazeto de la Esperanto-Movado
http://revo.bierfaristo.com/onidirasnun/

## Oregana Surprizo

SEATLO—Estvan Turtle—Ĉe la lasta kunveno de la loka Esperanto-grupo de Mills Valley, Oregano okazis granda suprizo. Anna Baker konfesis ke ŝi estis fakte sekreta FBI policano kiu penetris la grupon por kaŝe studi ĝin de interne.

Anna aliĝis en la jaro 2002, iom post la 9/11 atencoj kaj, iom post iom, fariĝis konato, eĉ gvidanto de la grupo. Post ŝia rivelo, tamen, la tri aliaj membroj de la grupo indikis ke ankaŭ ili estis sekretaj policanoj de la NSA, DEA, kaj Hejmlandaj Sekurecaj Servoj.

Phil Blonstein, de la NSA, estis la unua kiu aliĝis al la grupo en 1953 dum la kontraŭ-komunisma epoko de Joseph McCarthy.

Post la riveloj, Gary Bennett, de Hejmlanda Sekurecaj Servoj, proponis ke ili verku estonte nur unu raporto kiun ili povas ĉiuj ensendu. La propono estis akceptita unuanime kaj la grupo aranĝis sian sekvan kunsidon ĉe la nova ĉina restoracio ĉe Acera Strato je la venonta semajno. ODN

## Källë Kniivilä Tutmonda Ĵurnalisto




Källë Kniivilä estas la plej internacia kaj tutmonda ĵurnalisto en la Esperanta mondo. Post lia naskiĝo en Finlando, li veturis ĉirkaŭ la mondo dekfoje ĝis li transloĝiĝis al Svedujo kie li loĝas nun. Sed kiel jurnalisto, li ofte veturas al fremdaj landoj por raporti pri sekreta Esperanta agado. Venu kun ni al Paĝo 3 kie ni sekvos lin ĉirkaŭ la mondo.

## Proksimume Duono de Membroj de Lokaj Grupoj estas Registaraj Agentoj

BOSTONO—Jakobo Nigro—Nove malkaŝita dokumento de la CIA montras, ke multaj aliaj lokaj grupoj havas membrojn, kiuj estas registaraj agentoj.

Post la malkaŝo pri la membraro de la Esperanto-grupo de Mills Valley, ke ĉiu membro estis registara agento, la CIA (la usona spiona agentejo) priserĉis la membraron de ĉiu usona loka grupo, por lerni ĉu aliaj grupoj havis tiajn membrojn. **Oni Diras Nun** akiris ekzempleron de ilia fina raporto.

Laŭ la CIA raporto, el 397 membroj de 113 lokaj grupoj, 210 (53%) estas registaraj agentoj de iu speco aŭ alia:

87 laboras por usona registara agentejo (NSA: 41, CIA :19, DEA: 9, DIA: 6, aliaj agentejoj: 12),

120 estas pagitaj denuncistoj, sed ne formalaj laboristoj de la paganta agentejo,

3 laboras por aliaj-landaj (ne-usonaj) registaraj agentejoj (la nomoj de la landoj estis formarkitaj el la dokumento akirita de Oni Diras Nun).

En tri aliaj grupoj krom tiu de Mills Valley, ĉiu membro de la loka grupo estas aŭ registara agento aŭ pagita denuncisto.

Nur ses lokaj usonoj grupoj—du en Kalifornio, kaj po unu en Florido, Ilinojo, Masaĉuseco, kaj Novjorko—havas neniom da registaraj-agentaj membroj.

Neniom el la membroj de la usona landa asocio estas registaraj agentoj. (Ĉar tiu organizo "faras preskaŭ nenion" laŭ la CIA dokumento.)

En mane skribita noto sur la fina paĝo de la dokumento estas ordono, ke la CIA aliĝigu almenaŭ unu agenton en ĉiun el la ses grupoj kun neniom. ODN

# Redakcia Disputo ĉe ODN



**REDAKTORO**—Ne eblas ĉiam plaĉi al ĉiuj, onidiras. Foje, tamen, estas deviga skribi linion en la sablon kaj firme diri, "ne eĉ unu paŝon plu".

Mi parolas, kompreneble, pri mia tiel-nomata "kolego" por kiu la vorto "redaktoro" ne plu estis sufiĉe ĝis-osta kaj kiu nun devas esti "redakciano" en la kolofono. Se "redaktoro" sufiĉis por la majstro—por Zamenhof mem—mi diras al vi ke ĝi sufiĉas por ĉiuj.

Li fakte apenaŭ eĉ redaktas. Mi faras la plejmulton de la laboro—preskaŭ ĉiom! Li foje trovis kroman komon aŭ vorton misliterumitan, sed vera kompreno de la lingvo mankas al li.

Plue, ni havas taskojn en la oficejo: ĉiu semajne ni dividas kiu lavos la telerojn kaj kiu purigas la tapiŝojn kaj li neniam lavas la telerojn. Ĉu vi havas alergion al akvo kaj sapo s-ro "Redakciano"?



**REDAKCIANO**—Kiam homoj komencas kun-klopodon, taŭgas certigi kun-vidaĵon de la granda bildo.

Tion ni (la redakcio) supozis, ke ni havis. Sed ŝajnas ne. Ŝajnas, ke iu el la redakcio supozas sin ne redakciano sed redaktoro.

Kiu povus pensi tiel? Kiu povas pensi pri si ne kiel ano de la redakcio sed kiel redaktoro—homo sola?

Mi diros al vi, kiu povas: Mia tiel-nomita kolego. Kia aroganta (aŭ, kiel ni sendube preferus, kia orgojla) homo!

Ne sufiĉas, ke li ĉiame ŝanĝadas la fundamentajn vorton al nefundamentaj (ĉu "pluraj" signifas ion, kio "kelkaj" ne signifas?). Ne. S-ro redaktoro ankaŭ devas ŝtopi la klozeton ĉiufoje ke li uzas ĝin. Kaj li lasas ĝin ŝtopita! Li ŝajnigas kvazaŭ li tute ne scias kiu faris. Sed mi scias. Mi scias.

# La Plej Granda Esperanto-Biblioteko

## *Sed vi ne rajtas viziti ĝin!*



SALLAGA URBO—Tomaso Fleury—La usona Agentejo pri Nacia Sekureco (NSA) nun konstruas novan gigantan centron por enhavi ĉiujn datenojn kolektitajn de sia mondskala kolektadon de elektronikaj komunikoj. Oni proksimumas la enhav-kapablon inter 3 kaj 12 eksabajtoj.

Ĉiu elektronika mesaĝo kiun oni transsendas per la Interreto finfine alvenos ankaŭ ĉi tie. Epoŝtoj, SMS mesaĝoj, kaj retpaĝaj serĉoj, kompreneble, sed ankaŭ telefonvokoj kaj aĉetoj ankaŭ. Kian ajn mesaĝon oni sendas, la NSA ekkaptos ĝin kaj registros ĝin en tiu ĉi grandega arĥivo por ke, se post unu aŭ du jaroj ili decidos ke vi estas teroristo, eblas rigardi vian tutan historion.

Estis decidite tre frue ekuzi Esperanton kiel la bazo de la registra sistemo. Oni eltrovis ke per maŝina tradukado, oni povis plej facile traduki ĉiujn lingvojn al nur unu plej fidele. Plue, per Esperanto, oni povas registri la datenojn plej malgrande. Oni konsideris kiel aldona bono la fakto ke malmultaj homoj parolas ĝin, kiu helpas sekurecon.

Estas plej stranga paradokso ke oni dungas tutan armeon de Esperanto-parolantoj kiuj ne povas agnoski ke ili parolas Esperanton por gardi la sekreton. Kaj ke, en la mezo de Utahoan dezerton troviĝas la plej granda biblioteko de Esperantaj tekstoj—la tuta tekstaro de la homaro—pri kiu vi neniam aŭdis. ODN

# Källë Kniivilä Tutmonda Ĵurnalisto

**(daŭrigita de paĝo 1)**



Ĉe la Granda Muro en Ĉinio, li gajnis Pulitzer premion kaj savis katidon.




En Britio, li portis gravedan viron el inundo.



En Sirio, li forpelis ĥemian atencon kaj rekonstruis la Interreton.



En hispanio, li kaptis art-ŝteliston kaj trovis falsigitajn pentraĵojn en la muzeo.



Post fajro, li re-enkondukis minacatan testudon kaj la vermon kiu estas ties plej ŝatata manĝo.



En Egiptio, li nur turismis, ĉar oni devas iam amuziĝi.

# Komencanta Angulo

NOVJORKO—Jefri Smallberry—Saluton! Mi estas komencanto. Mi estas lernanta Esperanton nun dum du monatoj. Mi partoprenas kurson kun bona instruisto kiu multe helpas min. Mi estas tre feliĉa.

Esperanto estas bela lingvo kaj ankaŭ malmultekosta. La lecionoj havas tre malaltan semajnan koston. Kaj mia instruisto luas al mi lernolibron je tre favora prezo. Mi feliĉas pagi duoble por ke malriĉa studento en afriko ankaŭ povas lerni samtempe. Se mi ne havas sufiĉan monon en unu semajno, mia instruisto pruntas al mi.

Mia instruisto estas tre atentema. Li ofte telefonas kaj vizitas min. Mi foje vidas lin dum li sekvas min en la strato, butiko, kaj parko. Mi scias ke mi tiel lernos Esperanton pli bone.



Mi lernas multon. Mi lernas vortojn por la homa korpo kiel mano, genuo, umbiliko, buŝo, pugo, kaj peniso.

Mi devas iri nun. Mia instruisto diras ke li donos al mi specialan lecionon en la sekreta subetaĝo de la Esperanto-domo. Li helpos min lerni la sekretajn regulojn de la akuzativo. Mi reskribos al vi baldaŭ.

Ĝis revido!

## Oni Diras Nun!

http://revo.bierfaristo.com/onidirasnun/

**Oni Diras Nun** estas malofta sendependa eldonaĵo de la usona Esperanto-movado. Ni pretas diri ĉion—eĉ la veron, se necese—pri la sekretaj vivoj de la plej famaj esperantistoj. La ~~redaktoro~~ ~~redakciano~~ redaktoro bonvenigas viajn demandojn, leterojn, "onidirojn" kaj fotojn. Sendu al D-ro Istvan Bierfaristo; ~~Redaktoro~~ ~~Redakciano~~ Redaktoro <bierfaristo@comcast.net>

Oni Diras Nun!
ATTN: D-ro Istvan Bierfaristo; Redaktoro
5 Fairfield Street
Amherst, MA 01002